

La plago babelismo

Claude Gacond, 198-a radioprelego, 1967.07.26 & 1967.07.29

Cl.- Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La moderna homo malkovris, ke li ofte estas kaŭzo de siaj plagoj. Konsekvence li malkovris, ke li povas labori al la ĉesigo de tiuj katastrofoj.

A.- Por la neklera mezepoka superstiĉulo estis katastrofo kaŭzita de Dio kiel puno. Por la modernulo plago estas aŭ blinda natura katastrofo aŭ pli ĝenerale konsekvenco de malobeo al la naturaj fenomenoj.

Cl.- Superstiĉulo pentis antaŭ Dio por kvietigi la naturajn fortojn.

A.- Modernulo studas la naturajn kaj psikajn fenomenojn por povi antaŭvidi la katastrofojn kaj seeble eviti al la homaro plagajn revenojn.

Cl.- Iom da higieno sufiĉis por ĉesigi la klasikajn mezepokajn plagojn, kiuj regule senhomigis tutajn kontinentojn.

A.- Sed ekzistas multaj plagoj, kiuj ankoraŭ cikle vundas la homaran marŝadon aŭ ĝin haltigas.

Cl.- Ni pensu pri la interpopolaj konfliktoj, pri la subevoluiĝo, pri la minacoj de la malsato, pri la ekonomiaj kaj monaj krizoj, ktp.

A.- Jen modernaj plagoj. Fakuloj proponis rimedojn. Ofte grupaj profitoj aŭ sento pri senpoveco – kiuj fratas kun mezepoka superstiĉo – forgesigis tiujn avertojn.

Cl.- Antaŭ ol ekzameni kelkajn kaŭzojn kondukantaj al interpopolaj konfliktoj ni unue ekzameni kaŭzojn, kiuj malhelpas la disvastiĝon de nia lingvo, kaj tiel favoras modernan plagon : la babelismon.

A.- Ni spertis, ke ekpraktiko de la internacia lingvo ĉesigas la babelismon. Sed la plago de la plurlingveco tamen daŭre malhelpas la konstruon de unuiĝinta mondo, kiel en la legendo ĝi malhelpis la konstruon de la babela turo.

Cl.- Okdek jarojn la esperantistoj proponas sian rimedon. Kaj efikan rimedon ! La mondo, kaj ĉefe la internacia mondo restas surda al tiu alvoko. Eĉ provi la rimedon estas rifuzate.

A.- La esperantistoj malkovras, ke proponi rimedon ne sufiĉas. Oni devas konvinki vastan socitavolon pri la neceso de tiu rimedo.

Cl.- Ĉiu plago nutras sian klientaron. Hodiaŭ miloj, eble milionoj da homoj riĉiĝas dank'al la babelismo. Diplomatoj parolantaj la anglan estas hodiaŭ la delegitoj de la registaroj en la fakaj mondorganizaĵoj. Kono de la angla pli gravas, ol kono de la diskutata fako.

A.- La babelismo enkadrigas la turistojn. Kiom da fremduloj vizitantaj Hispanion povas vere parole rilati kun hispanoj ? Kaj retoj de naciaj konsulejoj kaj ambasadejoj perfektigas tiun enkadrigon.

Cl.- La komerco profitas pri la babelismo : imagu simple la nunan potencon de la angla, franca aŭ rusa libro-merkatoj. Korporaciemo protektas tiun babelismon : pensu al la nombro de oficistinoj, kies sola funkcio estas traduki komercajn leterojn.

A.- Babelismo estas utila inercia forto. Ĝi bremsas la sociajn ŝanĝojn, ĉar ĝi permesas kontroli la internaciajn intelektajn interŝanĝojn kaj evitigas intergentajn parolajn kontaktojn.

La plago babelismo

Claude Gacond, 198-a radioprelego, 1967.07.26 & 1967.07.29

Cl.- Babelismo evitas vere reformi la instruadon. Enkonduko de internacia lingvo en la lerneajn programojn trudas restrukturadon de la instruitaĵoj. Pli ol la duono de la monda instruistaro estas tro rutinema por partopreni propravole tian revolucion.

A.- Sed en ĉiuj profesioj oni retrovas la samajn timojn. Enkonduko de nova lingvo okazigus ŝanĝojn en mia ĉiutaga okupo. Tiujn novaĵojn mi nepre evitigu, pensas la mezulo.

Cl.- Sed kio estas plej danĝere, tio estas, ke tiu lingvo povus devigi la homojn ŝanĝi penskutimojn. Kiam esperanto nestos en la lernejoj, certe la historiaj libroj devos fariĝi pli objektivaj, se ili volas daŭre aperi en la naciaj lingvoj kaj ne cedi sian monopolon al esperantaj verkoj pli universalaj. Same por aliaj fakoj : geografio ekzemple.

A.- Dum la homaro ekkonas la plagon de la babelismo, la esperantistoj havas la senton posedi la rimedon al tiu problemo. Ili sentas, ke ili partoprenas grandan evoluon procezon. Ili kvazaŭ havas la impreson jam iomete vivi en la morgaŭa mondo. Ili ĝuas pri intelekta privilegio.

Cl.- Kie la aliaj homoj vivas kvazaŭ kiel surduloj, la esperantistoj aŭdas. Ili sentas, ke dank'al la lingvo de Zamenhof, ili akiris superecon sur la neesperantistoj.

A.- Aŭtomate ili eksterigas tiun senton, kaj la neesperantistoj ricevas senton pri malsupereco kaj fariĝas defendemaj. Imagu la konfuziĝon de la neantoj de la ekzistoraĵo de la nova lingvo, kiam ili renkontas homojn, kiuj rilatas per tiu ĵargono.

Cl.- Imagu la ĵaluzon de maldiligentulo, kiu neniam kapablis venki sian mallaborememon por finlumi la lingvon, kiam li vidas homojn profiti pri ĝiaj servoj.

A.- Multaj reagoj kontraŭ esperanto fontas el tiuj malserenaj sentoj ne aparteni al la privilegiitaro, kiu praktikas la internacian lingvon. Ju pli esperanto disvastiĝos, des pli tiuj senkonsciaj kaŭzoj trovos nutron.

Cl.- La esperantistoj estas malavaraj. Ili ŝatas dispartigi sian trezoron. Sed por povi profiti pri ilia riĉeco, oni devas mem labori.

A.- Malmultaj plenkreskuloj estas maturaj por tiu memlaboro.

Cl.- Imagu la konfuziĝon de klerulo, kiu vidas du simplulojn senpere rilati super limoj, kiuj por li estas hermetaj bariloj. Nur intelekta honesteco aŭ absoluta indiferenteco permesos al tiu renkontito ne fariĝi senkonscia malamiko al la internacia lingvo.

A.- Antaŭ diskonigi vian privilegion observu, al kiu vi parolas. Ne ĉie semoj povas ĝermi. Tiun veron ni devas memori. Ni ne ĵetus niajn semojn ien ajn, sed en pretigitan grundon.

Cl.- Nian senton aparteni al tutmonda popolo ni eksterigu ĉefe inter ni, por eviti pliigi la kontraŭstarojn al la disvastigo de nia lingvo.

A.- Sed tiu fakto ne malhelpu nin konscii, ke kiam la plago de la babelismo malaperos, multaj aliaj plagoj ankaŭ ekmalaperos. Interpopolaj konfliktoj malakriĝos. Debatoj internaciaj fine povos disvolviĝi inter fakuloj. Vartante la lingvon zamenhofan vi venigas tiun epokon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-